

NiaBulteno

ISSN:0871-9241

ABRIL - JUNHO 2005 APRIL - JUNIO • Numero 88

Informa Bulteno de Portugala Esperanto-Asocio
Boletim Informativo da Associação Portuguesa de Esperanto

Rua Dr. João Couto, 6-^o/cA, PT-1500-239 LISBOA • +351+217141359 • info@esperanto.web.pt • www.esperanto.web.pt



FRANCISCO PINHO

21-a R.P.E.: Alcácer do Sal

Preparatas la ĉijara renkontiĝo, okazonta ekaŭtune en ĉi bela ĉesada urbeto.. pĝ.4+12



(R.R.)

Finigiĝis malpaco kun UEA

Nia rilato kun Roterdamo finfine renormaliĝis: Post perditaj ĉekoj kaj malfruaj konteltiroj solvo trovitas kaj kunlaboro reeblas — ne frue... pĝ.3

Esperanton drakullande

La IFEF-kongreson en Braşov, Rumanio, ĉeestis Alcino ALVES, kiu priraportas. pĝ.9

AKEL iĝas io grava!

Projekto lanĉita kaj estrata de portugalo ekkaptis la atenton de E.E.U. kaj U.E.A.: Luís LADEIRA (dekstre) rakontas pri la evoluo kaj sekvoj de projekto ĉe kiu ne mankas videbleco. pĝ.6-7

Fabian & Nogeso
kursinstruas:



Vissero

Oporteplianon!

Ree okazis kurso por komencantoj en Oporto: Fabien TSCHUDY, esperantisto el Strasburgo, gvidis 20 horojn al 10 interesatoj, en kurso kiu iel relanĉis la lokan agadon. pĝ.8

forpasis Fernando de DIEGO: nekrologon far Gonçalo NEVES pĝ.10-11

Nia Bulteno (informa bulteno de
Portugala Esperanto-Asocio)
Numero 88 (apr.-jun. 2005)

ISSN:0871-9241

Redaktis:

António MARTINS-Tuválkin
Reviziis: A. da Silva ALMEIDA
Eldonkvanto: 360 ekzempleroj
Abono (4n-roj, nur ekster PT):
8-ono de landa MA de UEA
Unuopa ekz. (85-88): 5,00 €
(aliajn n-rojn laŭpete)
PDF-e havebla el http://www.esperanto.web.pt/nb_jxusa.html
Limdato por NB89: 2005.09.09
Finkompostita en: 2005.07.27



Portugala
Esperanto-
Asocio
Associação
Portuguesa de
Esperanto

(pessoa colectiva de utilidade pública)

☉ sabate 15:00-19:00; sideje
✉ Rua Dr. João Couto, 6 r/c A
PT-1500-239 LISBOA

☎ +351 217 141 359 ☉
☎ +351 217 933 924

✉ info@esperanto.web.pt aŭ
portugala@esperanto.web.pt
🌐 <http://www.esperanto.web.pt/>

CAE: 91331 NIF: 501 547 312
Fondita en 1972.04.25

Landasocio de U.E.A. ekde 1979

K-ano A: Faria de BASTOS
Membroj: 112(+66) en 2005.07.27
Monata kotizo: 1,50 €

(emeritoj kaj sub-18-jaruloj:
1,00 €; malriĉuloj: 0,00 €)

Aniĝkoto: 2,50 €

Pagojn al: (IBAN: PT50...=) NIB:
0035 064 000 025 961 430 49

GVIDORGANOJ: (ekde 2005.03.19)

Ĝeneral-Asemblea Stabo:

Prezidanto: Faria de BASTOS
Sekretarioj: Manuel RUAS
Werther SACRAMENTO

Estraro:

Prezidanto: José MARTINS
Vicprezidanto: MARTINS-Tuválkin
Sekretario: Alcino ALVES
Kasisto: Miguel BOIEIRO
Voĉdonantoj: Wilson BRÍGIDO
Alexandra G. e Paz
Hugo LOURENÇO

Kontrol-Komitato:

Prezidanto: A. da Silva ALMEIDA
Revizoroj: Vítor MARQUES
Francisco MELO

Neglekti la kernon de nia agado, jen la peko priakuzebla al la lasttempa redakto de *Nia Bulteno*. **Lernado de esperanto** estas ja esenca elemento de nia laboro sed pri tio, plendeblas, apenaŭ io legeblas jam du jarojn (escepto: NB85:5). Despli malbone se tio spegulas mankon de tiutema aktivo flanke de nia movada gvidantaro. Nu, per la jena numero **dispeliĝu tiuj timoj** — jen finfine atenton meritas pluraj instruagadoj: Fabien, AKEL, *Lernu!*, kaj plie. Legeblas pri ĉi temo ankaŭ kelkaj “netradiciaj” demandoj: Kiel diferencas lernado kaj instruado? Kion alportas la reta memlernado? Ĉu entute indas instrui la bazan nivelon? Reagon al tiuj defioj (ĉu provokoj?), pluajn raportojn, kaj ĉiperan spronon al nia agado esperas via *red.*

NEBALOTITAJ POSTENOJ:

Instruado: (vakas)

Libro-Servo: Silva ALMEIDA

Biblioteko: Werther SACRAMENTO
(periodaĵoj) Wilson BRÍGIDO
(eltondajoj) MARTINS-Tuválkin
(sonregistroj) Carlos MOREIRA
(diversaĵoj) (vakas)

Fotarkivo: Olga ALMEIDA

Subvencioj: (vakas)

Gazetaro: (vakas)

Ret- kaj komput-aferoj:

Nuno MAGALHÃES

A. MARTINS-Tuválkin

Luís OLIVEIRA

Sidejmastrumo: Pedrosa ALVES

HONORAJ MEMBROJ:

António da Silva ALMEIDA

Alsácia Fontes MACHADO ☐

Manuel de FREITAS ☐

Alberto Pedro da SILVA ☐

Adelino Franco SIMÕES ☐

Manuel de Sousa TEIXEIRA ☐

LOKAJ SEKCIJOJ:

PLUS — Portugala Loka Unua
Sekcio (nordokcidenta sekcio)

Repr.: Nuno MAGALHÃES

Fond.: 2002 **Membr.:** 15(+11)

✉ Rua Paulo da Gama, 550-12ªA
PT-4150-589 PORTO

☎ +351 917 721 868

✉ plusanoj@clix.pt

🌐 <http://www.esperanto.web.pt/plus.htm>

JUNULARA SEKCIO:

Portugala Esperanto-Junularo
Jovens Esperantistas de Portugal
Fond.: 1993 **Membr.:** 9(+21)

(L.S. de TEJO ekde 1996)

🌐 <http://www.esperanto.web.pt/pej.htm>

✉ pej@esperanto.web.pt

☉✉: ĉe P.E.A.

ALIAJ ORGANIZOJ:

Nogeso — Norda Grupo de
Esperanto-Studado

☉ kafejo *Estrela d'Ouro*; str.
Fábrica; Oporto (antaŭaverton)

✉ nogeso@gmail.com

🌐 <http://www.nogeso.cjb.net/>

☉✉✉: ĉe PLUS

Saluton! — *Cooperativa dos Amigos do Esperanto e da Natureza*

☉ 2-an dim. ĉ.m. 15:00; Cacém

✉ Avenida Bissaia Barreto, 2

PT-3360-191 PENACCOVA

✉ Rua do Miradouro, 12

PT-2735-300 CACÉM (SNT)

LANDAJ REPRESENTANTOJ:

U.E.A.: Manuel PINGUINHA (ktzp.)

ILEI: João SANTOS (deleg.)

E.E.U.: Faria de BASTOS

TEJO: Alexandra PAZ (A-kom.)

ILERA: Francisco MELO (CT1CGE)

EJA: Faria de BASTOS

SAT: Pedrosa ALVES (kotizp.)

IKEK: Alcino ALVES

IKUE: Salette dos SANTOS

ATEO: (vakas)

ASOCIO:

UEA kreskas & reamikas

Kresko ĉe la individua membraro de Universala Esperanto-Asocio plifortiĝis dum la komenco de la nuna jaro. Ĝis majfino estis registritaj 5424 individuaj membroj, kio estas 312 pli multe ol en la sama dato pasintjare. Oni fidas atingi 6000 individuajn membrojn ĝis la jarfino, membro-nombron kiun U.E.A. laste havis en 2001. Kiom da tiuj estos **portugaloj**?

Memorindas ke en 2003 kaj 2004 en nia lando mankis kaj kotizperanto kaj ĉefdelegito, kaŭze de la **protesta demisio** de A. da Silva ALMEIDA, al kiu administra malordo en la Centra Oficejo de U.E.A. kaŭzis konsiderindan monperdon (vd. NB83:4). Solidare kun lia ĉagreno, kaj mem suferante similan problemon, la estraro (en kiu Almeida rolis ĝuste kiel kasisto) decidis nenion iniciati pri lia anstataŭigo, kaj ne multaj fariĝis tiujare individuaj membroj — nur tiuj kiuj bezonis membriĝon pro kongreskotizo, kiuj estis jam mem membriĝintaj, aŭ kiuj ne sciis (aŭ ĉu ne konsentis?) pri la “bojkoto”.

Finfina **solviĝo** de tiuj problemoj reindigas la varbadon de individuaj membroj nialande. Dume, U.E.A. invitis novan kotizperanton, Manuel PINGUINHA, kaj estas nun la **taŭga momento** ankaŭ por renovigo de la delegita reto ĉe ni. **AMT+ASA+MB**

APLIKADO:

Alvokon al kunkantado

Post ensideja alvoko de Werther SACRAMENTO la 21-an de Majo, kreiĝas esperantista ĥoro en Lisbonio. Oni **atendas speciale** la aliĝon de tiuj nemalmultaj kiuj, kiel la alvokinto mem, pri kantado okupiĝas neprofesie sed serioze, en nemovadaj ĥoroj. Sed estas alvokataj **ĉiuj kantemuloj** kiuj povus kunveni tri aŭ kvar fojojn monate por provludoj. Oni celas **evolui** esperantlingvan kantadon nialande, **popularigi** esperantajn versiojn de portugallingvaj kantoj, kaj **prezentiĝi** en movadaj aranĝoj. Interesatoj kontaktu la sidejon. **AMT+WS**

BULTENO:

Cit' civita

En tiama numero de la historia kaj lasttempe eĉ polemika gazeto *Heroldo de Esperanto* (2067, 2005. 02.20-03.10), sur pĝ. 1, aperas represaĵo el *Nia Bulteno* 86. Tiun atenton meritis la teksto de Nuno MAGALHÃES pri uzo de esperanto en la filmo *Blade Trinity* (pĝ. 9). **AMT**

BULTENO:

Klarigon

En la redaktista kroniko de NB87 (pĝ.2), unu frazo tiom mallerte redaktiĝis (post multo da ŝanĝo kaj ŝovo) ke eblus el ĝi ricevi **gravan miskomprenon**: Apud kie tekstas, ke ne plu «troas la (eternaj) komencantoj, la “trudvarbitoj” kaj la fuŝuloj», asertatas ke tio estas «nepra evoluo: ja la Naturo apenaŭ hezitas forporti la veteranojn». Tiu kontrasto **ŝajne implicas** ke jen per forpaso de veteranoj tiel pliboniĝas la movadano — sed **oni male celis** ke ĝuste pro la demografia perdo de indaj movadanoj estas bone ke oni tamen sukcesas trovi novajn kun la sama kvalito. **(Red.)**

GASTOJ:

Pancorbo Lisbone

Manuel PANCORBO, konata madrida esperantisto kaj (tiam estonta) redaktisto de *Boletín* (bulteno de HEF), vizitis Lisbonon la paskan semajnon. Mallonga ĉeesto en nia sidejo ebligis kontaktfirmigon kun kelkaj gvidantoj de la portugalia esperanto-movado. **AMT**

APLIKADO:

Iuri antaŭen

Aperis maje paĝaro kun esperantaj tradukoj el la ĵurnalo *Avante!*, informorgano de la Portugala Komunista Partio: <http://www.avantesperante.no.sapo.pt>, zorge de Iuri GASPAS. **IG**

SIDEJO:

X donacita!

Meze de junio nia oficeja ilaro pliriĉiĝis: Fotokopiilon Xerox 5014 donacis P.E.A.-ano Vítor MARQUES. Tiu nova maŝino ŝparigos je okazaj kopioj kaj eĉ je malgrandaj eldonoj; ĝi eble eltenos presi *Nian Bultenon* — se jes, **tiu ĉi ekzemplero** estos jam farita per ĝi! **AMT**

ARANĜOJ:

21-a R.P.E.



Francisco Pinto

Ekaŭtun' en Salkastelo

■ António MARTINS-Tuválkin

Renkontiĝon en *Alcácer do Sal* la estraro ekkonsideris jam malfrue, dum la marta kunveno, informite de la avejrlaguna skipo (vd. NB87:9) pri prefero je 2006. Tial oni "retretis" al apudlisbona loko, por laŭeble certigi la aranĝon en 2005. Kasisto Miguel BOEIRO aktivigis siajn eksurbestrarn kontaktojn kaj el diversaj eblecoj (*Palmela*, *Sesimbra*, *Setúbal*) preferon ricevis tiu bela ĉesada urbo. Ties municipestraro sciigis sian oficialan apogon komence de julio — konfirmatas aŭlo, halo, salono kaj buso. Kiel okazdaton oni elektis la **lastan semajnfino de septembro**.

Alcácer do Sal — nomo kiu rilatas kaj al ĝia maŭra fortreso (arablingve: "القصر" = "al qasr" = "la kastelo") kaj al la tradicia marsala rikoltado (de romianoj renomata el *Eviom* al *Salatia Vrbe Imperatoria*), kaj kiu esperantigeblas kiel Salkastelo: Eta urbo ĉe la norda bordo de la rivero Sado, je la radiko de ties lagunara elfluejo, 80 km sudoriente de Lisbono kaj 40 km de *Setúbal*: fama pro siaj pinnuksaj frandaĵoj, historia riĉo, milda klimato kaj trankviliga pejzaĝo — ĝi atendas nin.

Detalojn pri veturo, programo, gastigo kaj manĝoj vi trovos en NB89. Ĝis tiam, agendumu: 2005.09.24-25: **la 21-a R.P.E., en Salkastelo.** ■

INSTRUADO:

Indoj kaj endoj de nuntempa lern(ig)o

Memlernado de esperanto ne estas nova situacio, sed la populariĝo de retuzo kaj hejma komputado ĝin revivigis kaj “represtigiĝis”. Kaj pli ol iam, tiu lernado estas nun ege efika, kaj iel universale atingebla. Ties viglegaj atingoj aparte brilas ĉe la nesukcesaj rezultoj de grupaj kursoj, kie daŭre sukceson oni konsideras se almenaŭ unu-du komencintoj entute atingas la finon...

Ĉu ne same, tamen, okazas kun reta memlernado? Ĉu tie ne abundas efemeraj interesigoj kaj abortaj eklernoj?... Nu, jes. Sed tio okazas sen “malŝparo” de investitaj reklam- kaj instru-rimedoj: Memlernilo postulas tiom da laboro por lernigi centon kiom 250-on aŭ milon...

■ António MARTINS-Tuválkin

Post tiu konstato mi venis hezite al la jena “blasfema” propono: Ĉu ne pli bonus direkti nian klopodadon al kursa instruado de la pli altaj niveloj, lasante al la reta memlernilaro la taskon “kri-bri” la seriozajn kaj kapablajn memlernantojn? Per tio kompreneble mi ne celas forlason de la baza nivelo: Necesas ĉiam apogi ĝin, informi pri ĝi, krei memlernilojn kaj helpi memlernantojn. Sed ĉesus la (preskaŭ) senfrukta laborado. (Laŭ nia sperto, sukcesaj eklernintoj restas stabile en la pluaj kursoj, kie forlasado kaj “malapero” apenaŭ okazas.)

Supozeble estas tamen aliaj opinioj ĉiprie — estus interese diskuti... ■

INSTRUADO:

Lernu.net furore en la ret'!

Facile uzebla, plene agordebla al ĉiu uzanto kaj konstante zorgata de komput- kaj instru-fakularo. Jen kial la lingvlerna retcentralo *Lernu.net* fariĝis tiom populara kaj “kreis” tiom multajn esperantistojn. Krom lernilojn kaj kursojn (jam 14: kun / sen helpanto, diversnivela kaj diversstila) ĝi enhavas aŭtomatan vortaron,

internan poŝton, tujmesaĝilon kaj plurlingvan fasadon. *Lernu.net* ekzistas jam du jarojn kaj multaj portugaloj lernas(is) per ĝi, el entute 87 registri-

ĝintoj el nia lando. Krome troveblas unufojaj scivolemuloj kaj helpemaj spertuloj — ĉu i.k. vi mem? Jen *Lernu.net*, apoginda kaj uzinda servo! **AMT**

INSTRUADO:

AKEL-projekto, la Jaro Dua*

■ **Luís LADEIRA**

Ĉijare finfine E.U.-programo *Socrates* subtenis la projekton AKEL (Alternativa Komunikado inter Eŭropaj Lernejoj). Tial tri lernejoj de tri landoj – Polio, Hispanio kaj Portugalio – kune daŭrigis sian projekton pliprofundigi eŭropcivitanecon per Esperanto.

Tiu estis jam prezentita al movado per pluraj rimedoj (*Nian Bultenon*, la retpaĝojn <http://www.web.esperanto.pt/akel/>, <http://www.euro.za.pl/> kaj <http://www.esecbraamcamp-freire.rcts.pt/>, kaj aliaj — kiel *Radio Polonia* aŭ *Libera Folio*): Ĝi ebligas lernadon de esperanto kaj enkondukon al naciaj lingvoj de la partneroj — laŭ plenumo de pluraj paŝoj: konigi la partoprenantojn mem, kaj ties lernejojn, urbojn kaj landojn.

Lernjare 2004/05, la partneroj decidis pri sia interkomuniko kaj virtuale kaj reale. Ni ekinterŝanĝis retmesaĝajn kontaktojn kaj preparis intervizitojn.

Enkadre de AKEL la polaj partneroj ĉe ibera duoninsulo...

La unua, okazinta en 2005.02.13-19, alvenigis sur la iberan duoninsulon niajn polajn partnerojn — kvar gelernantoj kaj kvar instruistinoj. Ĉe ni, en Portugalio, dum la mateno okazis klasoj de Esperanto, kaj de portugala

lingvo, krom libera tempo por retumado — ĉio en la partnera lernejo, kie estis ankaŭ la tagmanĝo. Posttagmeze, ĉiutage kaj laŭvice, ni vizitis malaltan Lisbonon, *Belém* kaj naturparkon, krom *Cascais* kaj *Sintra*. Tre ĝojigis la polojn atingi la Rokan Kabon, plej okcidentan kontinenteŭropan lokon (vd. foton pĝ.1), kaj vidi Atlantikon ĉe *Cascais*.

Vendrede matene, ni (kvar gelernantoj kaj tri geinstruistoj portugalaj) busveturis al niaj hispanaj partneroj de *Don Benito*, en la hispana Ekstrema-duro. Tie, post la formala tamen amika akceptado en la lernejo, ni tagmanĝis kune kaj veturis al mezepoka urbo *Trujillo*. Reveninte, ĉiu ripozis ĉe sia gastiganto. Sabaton, post bilanca kunsido de la partneroj, vizito al *Don Benito* kaj tagmanĝo, ĉiuj revenis hejme: ni, rekte al Lisbono; la poloj, busveturonte tra Madrido, Barcelono kaj Strasburgo al Koŝalino. Tre longa vojaĝo — laciga, tamen riĉiga opcio. La gastigado ĉe lernantaj kaj instruistaj partneroj permesis monŝparon.

...kaj ĉiuj partneroj en Koŝalino

Reciproka vizito okazis en 2005.04.03-05. Ni flugis de Lisbono ĝis Berlino, kie ni atendis niajn hispanajn partnerojn. Dume ni vagadis (preskaŭ ĉiam per subtera fervojo) kaj vizitis la faman *Pergamo*-muzeon (la antikvaj greka kaj babilona mondoj translokiĝitaj al centro de Eŭropo!), la katedralon, la pordegon de Brandenburgo (imagante la muregon, kiu antaŭ nelonge dividis la urbon kaj la mondon), kaj promenis laŭ la *Unter den Linden* (Tilialeo).

Lunde, jam kun niaj hispanaj partneroj, ni ekveturis al Koŝalino, en pola ►

(*) Tio ĉi estas reduktita versio de la plena teksto, kiu legeblas en <http://www.esperanto.web.pt/akel2005.htm>. Kromajn novaĵojn pri AKEL '2005-2006 — inkl. pri la subteno de E.E.U. kaj de U.E.A., kaj pri novaj partneraj lernejoj en Britio kaj Litovio — legu en NB89. AMT

INSTRUADO:

**Plia lernigo
ĉe l' aĝularo**

Aperis jarkomence *Usalma* (*Universidade Sênior de Almada*), libertempa instruejo por emeritoj kreita de loka instruista asocio kaj subtenata de la koncerna municestraro. Laŭ iniciato de esperantisto loka, Eduardo CRISPIM, estos proponita aldono de esperanto al la instruataj fakoj, kiel jam okazas en du similaj instancoj: *UITI* kaj *Academia "Saudação"*. **AMT+EC**

ARANĜOJ:

EĈ 8 al IKJ!

Ĝuste nun (julifine) estas en *Zakopane* (Polio) 6 portugaliaj junuloj, ĉeestantaj la 61-an Internacian Junularan Kongreson (org. de TEJO). Tio rekordas (unu en 1987; po du en 1995 kaj 2004), kaj inkluzivas du sub-18-jarajn komencantojn! Krome ĉeestas Viriato (ne junulo, el Bruselo), Rut' (ankaŭ en U.K. kaj KEF!), Xana, Vesperto kaj Spunko (kaŝnome, aĝorde). El Portugalio ekis ankaŭ Fabien (pĝ. 8). Legu priĉe en **NB89!** **AMT+NM**

MOVADO:

**Kion nova
post HEK?**

Dum la ĵusa 64-a Hispana Esperanto-Kongreso, apud Madrido (vd. raporton en **NB89**), elektigis nova estraro de HEF. Post pena serĉado de volontaj prezidantoj, estis elektita Augusto CASQUERO, konata i.a. pro la organizado de la U.K.'1993, en Valencio, kaj de postaj aranĝoj. Vicprezidanto estos Lupe SAENZ, estro de la madrida "Liceo". **AGP**

► Pomario, ĉirkaŭ 400 km fore. Ricevitaj de niaj partneroj kaj siaj familianoj en lernejo, ĉiuj ripozis hejme de siaj gastigantoj. La programo inkuzivis vizitojn al Koŝalino kaj al la fama havenurbo Gdansk — sidejo de "Solidareco", tiu sindikato, kiu ekmalstarigis la komunistan reĝimon — al ripozloka vilaĝo *Mielno*, ĉe la Balta Maro; promenadon al monto *Chełmska* apud Koŝalino; krom klasoj de Esperanto kaj pola lingvo dum du matenoj en la lernejo.

Tamen ne ĉio programo plenumiĝis, ĉar pro la morto de la papo Joahno Paŭlo la Dua okazis nacia funebra tago. Bedaŭrinde la programero plej rompita estis precize tiu pri lingvoj. Tio tre malhelpis la uzon de la internacia lingvo kaj la eklernon de la pola. Tamen pro afableco de la prezidanto de loka sekcio de Pola E-asocio, s-ro

Czesław BARANOWSKY, ni rajtis ĉiĉeronadon esperantlingve tra la urbo. Kaj pro ĝentileco de niaj gastigantoj facile ni lernis komunuzajn polajn esprimojn por saluti, danki k.t.p.

Dimanĉe alvenis la adiaŭa horo. Adiaŭante niajn afablajn gastigantojn, ni kune busveturis ree ĝis Berlino. Malvarmis la vetero, sunis kaj pluvis kaj ni spertis preskaŭ ĉiujn sezonojn. Dum la antaŭa restado en Berlino kaj Koŝalino ĉiam primtempis. Veturante tra Pomerio rekte al flughaveno ni spertis la mankantatan sezonon: neĝis! Flugonte per malsamaj flugkompanioj la iberaj partneroj veturis al siaj malsamaj flughavenoj.

Tre ĝoja kunestado! Ĉu per Esperanto? Bedaŭrinde ne tiom, kiom oni dezirus... Tiel finiĝis la renkontiĝado, atendante novan venontlernjare. ■

ASOCIO:

DL 124/96

Tiuj kiuj je la pasintjara impostdeklaro (pri 2003) indikis P.E.A.n kiel profitonton de la deviga kromono laŭ leĝo 124/96, jam verŝajne ricevis raporton pri tio. B.v. sciigi pri la rezulto — ŝajnas ke tiun indikon la Fiskministerio ignoris, eble ĉar nia asocio ne estas religia. *JMM*

INSTRUADO:

Naturstudo

Gvidas ĉiujfaŭde en la lisbona sidejo de Portugala Naturalogia Societo ties membro kaj P.E.A.-ano Miguel BOEIRO esperantan studrondon. Ĉeestas kvino da interresatoj, plejparte “veteranaĝaj”. *AMT+MB*

INFORMADO:

Panellernej'

Okazis februarfine en la mezlernejo de *Taipas* (mun. *Guimarães*) lingvo-semajno kun tago pri esperanto, laŭ iniciato de loka instruisto Isabel MACHADO. Montriĝis al ĉ. 200 lernejoj la asocia panelekspozicio, tie danke al la zorgo de Nuno MAGALHÃES. *AMT*

INSTRUADO:

Postkurse — landlime

■ Nuno MAGALHÃES

Okazis de marto ĝis junio nova Esperanto-kurso en Oporto, ĉifoje instruada de Fabien TSCHUDY (vd. *NB87:3*), per rekta metodo (vd. foton). Estis 10-leciona kaj denove organizintoj dankas al ISEP (Oporta Inĝ. Superlernejo) pro ĉambro-prunto. Partoprenis 10 homoj — laŭplane oni pluigu renkontiĝojn, de nun nogese (vd. pĝ. 2) en kafejo *Estrela D'Ouro*.

La lasta leciono estis fakte renkontiĝo inter lernantoj kaj de Oporto kaj de Vigo. La loko: *Tui / Valença*. Venis kaj lernantoj kaj veteranoj: el Portugalio mi, Alexandra PAZ, David RICARDO, Fernando COSTA, Carlos MOREIRA, Noémio Lago de OLIVEIRA kaj Fabien TSCHUDY; el Galegio Antonio VALÉN, Suso MOINHOS, Xaime CANOA kaj Santiago ESTÉVEZ.

Antonio nin gvidis tra *Tui*, tra ĝia malnova parto, el kies parkoj videblas Portugalion. Li organizis tagmanĝon por la esperantistaro. Laŭ portugala premo oni kafumis ĉe la alia flanko de landlimo, en *Valença*, sub varmega suno. Estis plaĉa kaj agrabla renkontiĝo, espere la unua el pluraj. ■



Vespero

ARANĜOJ:

Spertoj el IFEF-kongreso en Rumanio

■ Alcino ALVES

De la 7-a ĝis la 13-a de Majo 2005 okazis en la rumana urbo Braŝovo (*Braşov*), la 57-a Kongreso de IFEF (Internacia Fervoja Esperanto-Federacio), al kiu mi aliĝis. Mi ne celis fakajn spertojn, ĉar mi ne estas fervojisto. Sed la deziro koni *in loco* diversajn aspektojn de la vivo en Rumanio kontribuis al senhezita aliĝo. Aliflanke, deficitita kono de realaĵoj de tiu lando spronis mian scivolemon, kies saton tiu evento facile permesus.

La unua surprizo rilatis ĝuste al la karaktero de la rumana popolo, kiun la portugaloj tuj asocias al la ciganoj rumandevenaj, kiuj, almozetante sur la urbstratoj, donas erarigan bildon pri tiu orienteŭropa lando. Ververe, la rumanoj kun kiuj mi kontaktis (esperanto-parolantoj kaj aliaj) montris sin, ĝenerale, afablaj, simpatiaj, honestaj kaj kleraj.

La urbo Braŝovo, kiu dum tiuj tagoj festis sian 770-an jariĝon, estas gasta, ĉarma kaj bone zorgata de la loka magistrato. Rimarkinda estas ankaŭ la konduto de ĝia loĝantaro. Ĉiujn tagojn, post la laborperiodo, ĉiuj stratoj, parkoj kaj ĝardenoj estis plenplenaj de homoj, je ĉiuj aĝoj, kiuj trankvile kunvivadis. Ili ŝajnis feliĉaj, malgraŭ siaj nunaj ekonomiaj malfacilaĵoj.

La ĉirkaŭaĵoj prezentas neforgeseblajn naturajn vidindaĵojn. Sur altaj kaj krutaj montoj abundas imponaj fagoj, abioj, larikoj, sambukoj, diversspecaj aceroj kaj mirindaj sovaĝaj floroj kun-

ezistantaj kune kun tute apuda neĝo. Post ĝia fandiĝo tuj ekaperas belegaj krokusoj kaj diversspecaj liliacoj je mirindaj koloroj.

Rilate al la kongreso mem, miaj laŭdoj ne estas tiom vibraj. Fakte, sentiĝis kelkaj misoj, kiuj eble ŝuldiĝis al manko de sperto de la organizintoj, malgraŭ ties entuziasmo kaj sindonemo. Rezulte de tiuj mankoj, mi ne sukcesis enskribiĝi en la programitaj vizitoj kaj turismaj ekskursoj. Tamen, ilin mi plenumis danke al certa inventemo mia kaj helpo de lokaj esperantistoj. Tio gravis, ĉar unu el miaj ĉefaj celoj estis ĝuste turismumi.

Je la lingva vidpunkto substrekindas la bona nivelo de la kongres-responduloj rilate al la uzo de esperanto. Ankaŭ estas mirinda la ekzisto de diversaj rumanaĵoj tradukitaj en esperanton kaj la eldonado de interesa bulteno far de Rumana Esperanto-Asocio. Tio surprizigas se oni konsideras ke dum la rumana socialisma periodo la esperanto-movado ne estis bone akceptata de la politika reĝimo, kontraŭe ol tio, kio okazis en aliaj sam-sistemaj landoj.

Ĉirkaŭ ducent homoj, el 22 landoj, partoprenis la kongreson, kiun mi konsideris kiel kopion de UK, je dimensio konforma al la fervoja kunfrataro. Videblis la eternaj balbutantoj, krokodilantoj kaj lamantoj, sed ĉiuj kunportis la entuziasmon de tiuj, kiuj sentas sin en "unu granda rondo familia". ■

HOMOJ:

La Oldulo kaj l' Amaro

** Fasketo da pensoj ĉirkaŭ la
morto de Fernando de DIEGO*

■ *Gonçalo Neves*

Fernando de DIEGO de la Rosa, fekunda tradukisto, recenzisto, kritikisto, eseisto kaj publicisto, klera homo, polemika figuro, adorata de iuj, anatemata de aliaj, eniata de pluraj kaj ignorata de multaj — mortis. Li planis «atendi la alvenon de la aĝa frato de la Songô» en *Wrocław*, sed la granda Falĉisto preferis lin viziti hejmlande, kien li revenis amare kaj solece post la forpaso de Czesia, la pola edzino. Li oldis 86 jarojn, sed lia menso lucidis ĝis la fina rajpo de la motoro korpa.

Malfacilas objektivi pri homoj, eĉ se kadavraj, skeletaj aŭ jam polvaj. Eĉ pli dorna la tasko kiam oni la juĝaton konis persone. Nun mi ĝojas ke Fernandon mi neniam renkontis, ke lian voĉon mi neniam aŭdis, ke neniun leteron aŭ bileton mi interŝanĝis kun li. Eble tial mi nun kapablos iom proksimetri al dezirata subjektivo.

Lin mi lernis rendevui sine de streĉa silento, kiun interrompis nur la paĝa susuro de mia leg-avido. Frazon post frazo, vorton post vorto, mi poiome mergiĝis en fabelan mondon, kies solaj loĝantoj estis puraj tintoj kaj ŝvebaj pepoj. Tiun mondon eblas nomi stilo. Jes, antaŭ kaj super ĉio Diego

rangis kiel stilisto. Lian oreton agacis ne nur ĉio kakofonia, sed ankaŭ ĉio gurda, teda, monotona kaj plata. Por dishaki sintaksajn veprojn li tratalpis nian klasikan grundon kaj esploris ties plej profunde kaŝitajn ercojn. Ekzemple, dum aliaj proponis kaj ekuzis ekstravagancajn rimedojn por dampi la grincon de nia fifama paro "tiuj kiuj" (ĉi-strebe Lanti lanĉis — sed poste repudiis — la formon "ti-kiuj"), Diego preferis resti cise kaj ĉerpi el la interna bunto de la lingvo. Tion ekzemplu jena eltiraĵo el *Donkiĥoto* (ĉap. XIII, p. 95):

La rigardantoj, la fosantoj de la tombo kaj la ceteraj homoj gardis impresan silenton, ĝis unu el la kadavro-portintoj diris al la alia (...)

Oni rajtas objeti ke ĉi-terene liaj solvoj ŝajnas kolumb-ovaj, ke iu ajn meztalenta kapablos ilin elpensi kaj senĝene apliki. Prava objeto. Tamen endas riposte demandi: kial tiajn ovojn ne starigas pli da Kolumboj, kial post pli ol cent jaroj nia prozo ankoraŭ tren-paŝas ĉe multaj aŭtoroj, kial ankoraŭ knaras tiom da plumoj, eĉ renomaj? Ĉiaokaze, ĉi faceton de Diego oni ordinare ignoras aŭ prisilentas.

Kiam temis pri tratanĉo de gordiaj nodoj leksikaj, Diego plukis el pluraj arboj. Li ne nur insiste kaj persiste uzis vortojn neofte renkontatajn en la demotika esperanto, abunde ĉerpante el Kalocsay, Waringhien kaj aliaj korifeoj, sed eĉ lanĉis kelkajn novaĵojn el sia propra ateliero. Ekzemple, en liaj lastaj tradukoj aperas "mokra", tre bela kaj elvokiva vorto, samsignifa kiel la demotika "malseka". Tiun vorton, el la pola "mokry" kaj identa kun la rusa "мокpый", inspiris al li la edzino. Ĉi faceton ►

* Represita el *Fonto*; aperas ankaŭ en *Boletín*. Dua (kaj lasta) parto publikigis en NB89.

► de Diego oni supraĵe komentas en kulisoj kaj laŭte distrumpetas en agoroj. El tia pritrakto rezultas la famo de Diego kiel neologo, dum lia enverguro kiel stilisto iel postrestas duarange.

Oni emas preterrigardi ankaŭ aliajn faktojn pri Diego. Ĉu niaj oficialaj kaj duonoficialaj opiniistoj scias ke Diego produktis la impresan kvanton da 3560 tradukpaĝoj? Ĉu ili konscias ke tiu paĝ-amaso rezultis el laboro intensa, streĉa, rigora, esplora? Ke li ĉion trameditis, reviziis, kribris, poluris kaj emajlis ĝis la lasta imagebla detalo? Ke li komparis siajn tekstojn kun alilingvaj tradukoj? Ĉu tiaj opiniistoj scias ke li estis ankaŭ senlaca leganto kaj vastpaletra analizanto de nia literaturo? Ke li recenzis ne malpli ol 217 verkojn?

Diego ja konis ĉiujn fibrojn kaj neŭronojn de esperanto. Nenio ĉe li rezultas el kaprico, frivolo aŭ hazardo. Evidente li ne ĉiam trafis. Tamen liaj solvoj neniam ŝajnas ekstravagancaj, idiolektaj aŭ ŝibolektaj. El ĉio liapluma emanis seriozo, kompetento kaj talento, eĉ se oni ne konsentas pri tiu aŭ alia vorto, pri tiu aŭ alia tropo.

La oldulo sinkis amare. La skipa reviziado de lia giganta vortaro hispana-esperanta (1279-paĝa) treniĝis dum jaregoj kaj kaŭzis al li ne pokan angoron. Kiam fine ĝi eldoniĝis en 2003, li jam komencis sobgliti la viv-taluson. Sed lian amaron nutris ankaŭ la maljusta bildo kiu restis post iom da kuraĝaj elpaŝoj liaflankaj, nome kiam li aŭdacis publike kritiki mistalentajn verkojn de Auld, Piron kaj aliaj popularaj figuroj de la verda panteono. Kiam oni tanĝas guruon, oni riskas batuon. ►NB89

LIBROJ:

Tinĉjo en Lisbono!



Tinĉjo en Tibeto estas la plej nova eldono de tiu ĉi serio, jarojn post *La Nigra Insulo* kaj *La Krabo kun Oraj Pinĉiloj*. Kunlabore kun la franclingva eldonejo *Casterman* prizorgis la eldonon loka asocio *Lille-Villeneuve Espéranto*. Ties gvidanto Michel DECHY vizitis nian sidejon en 2005.04.16 kaj detale klarigis pri la eldonata verko kaj pri ĝia traduko — kiun ree faris Hervé GONIN, konata esperantista aŭtoro. La kunportita dekkvino da ekzempleroj plene disvendiĝis (po 15,00 €), krom unu donaco al la asocia biblioteko. *Tinĉjon en Tibeto* oni konsideras la plej “matura” ero el la tuta 24-voluma serio. Per tiu ĉi eldono plu riĉiĝas la tradukita blidstria verkaro esperantlingva, kie ne mankas francaj ĉefverkoj el la serioj *Astérix* (seso da!) kaj (ĵuse) *Gaston Lagaffe* — Gastono Lafuŝo. (Vd. ankaŭ NB31:5 kaj NB85:8.) Bonus se belgaj, brazilaj aŭ usonaj esperantistoj simile entreprenus ĉe si... AMT

21-a Renkontiĝo de Portugalaj Esperantistoj, 2005.09.24-25:

Alcácer do Sal



Post la arbarmontoj kaj krutvaloj de *Tábua* en septembro 2004, venu ĝui ĉijare la riverspegulon kaj vastejojn de *Alcácer do Sal*. Surbaze de la pasintaj spertoj prepariĝas stimula programo kun okazoj por amuzo, debato kaj klerigo. Vd. pĝ. 4 kaj sciigu jam vian ĉeeston!

AM

REMETENTE:

Associação Portuguesa de Esperanto

Rua Dr. João Couto, 6-r/c A

PT-1500-239 LISBOA

PORTUGAL

DESTINATÁRIO:



nº de sócio
anunero

últ. quota paga
lasta kotizpago

foto
foto



laste ricevita
intersanĝnumero

